

Pri la esperanto-biblioteko de Károly Fajsz.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1983 aprilo 14 kaj 16.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-107/SRI-107-2-679-1983-Claude-Gacond-Pri-la-esperanto-biblioteko-de-Karoly-Fajsz.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Komence de la monato marto mi restadis dum unu semajno en la urbo Budapeŝto. Unu el la celoj de tiu vojaĝo estis kontakti la posedantojn de esperanto-bibliotekoj, ĉar personaj kontaktoj ĉiam faciligas tiujn, kiujn ni perletere efektivigas. Inter miaj multaj funkcioj troviĝas tiu de arkivisto de la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia ([CDELI](#)) de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Tiu ĉi dokumentejo posedas milojn da duoblaĵoj, kiujn ĝi provas interŝanĝi kun aliaj posedantoj de duoblaĵoj cele al reciproka kompletigo de la kolektoj.

A.- Tiu ĉi interŝanĝo povas komenciĝi, nur kiam la koncernaj dokumentejoj ne nur katalogis la proprajn kolektojn, sed kiam ili ankaŭ posedas listojn de la duoblaĵoj. En nia dokumentejo en La Chaux-de-Fonds nur nun povas komenciĝi la interŝanĝoj koncerne la revuojn, ĉar finiĝis la registrado de la posedataj kaj mankantaj revu-numeroj.

Cl.- En Budapeŝto s-ro [Károly Fajsz](#) estas konata kiel posedanto de esperanto-biblioteko, kaj jam ekde pluraj jaroj li siaflanke finis la katalogadon de siaj revuo-kolektoj, kaj li proponas al la aliaj dokumentejoj en la mondo siajn duoblaĵojn por interŝanĝo. Okaze de mia restado en Budapeŝto mi nepre volis renkontiĝi kun tiu ĉi kolego, kaj tio, kion mi vidis, multe impresis min.

A.- En la triĉambra loĝejo, kiun gesinjoroj Fajsz okupas en impona, sed malbone prizorgata domo konstruita fine de la deknaŭa jarcento, libroj staras ĉie sur bretaĵoj, kiuj kovras preskaŭ ĝisplafone ĉiujn murojn. Eĉ sub la litoj, en la ŝrankoj, libroj trovis rifuĝejon. Kaj preskaŭ la tuto koncernas nur esperanton. Jen tio, kion malkovris mia edzo.

Cl.- Kaj meze de tiuj libroj, kiuj baldaŭ atingas la nombron de kvin mil bibliografiaj unuoj, entuziasme deĵoras kvar homoj: la kolektanto mem, s-ro Károly Fajsz, kiu esperantiĝis nur en 1966 okaze de la Universala Kongreso Budapeŝta, lia edzino kaj du helpantinoj, kiuj prizorgadas la katalogadon de la tuta kolekto. La edzino ne nur akceptis, ke la koncernan loĝejon invadu tiom da libroj, revu-kolektoj kaj eĉ mebloj, kiel la skribotablo de Kálmán Kalocsay. Ŝi aktive kunlaboras al tiu ĉi entrepreno, multobligante la slipojn, kiujn pretigas la kunlaborantinoj, kiuj estas bibliotekistinoj kaj pretigante la manĝojn por la nelacigebla kvaropo.

A.- Baldaŭ aperos katalogo pri tiu ĉi privata eaperanto-biblioteko de Károly Fajsz.

Cl.- Okaze de mia vizito ĉe s-ro Károly Fajsz mi registris lin, kiam li prezentis sian bibliotekon:

KF: La bibliotekoj ĝenerale ne estas ekstraordinaraj. Nur riĉaj kaj malriĉaj. Bedaŭrinde ni vivas en malriĉa lando, do jam kelkcent libroj signifas ekstraordinaran riĉecon. Ni dum dekkvin jaroj sukcesis akiri pli ol kvinmil volumojn el libroj, krome el periodaĵoj mil binditajn jarkolektojn kaj por kompletigi pli ol kvarmil jarkolektojn.

Cl.- Kaj nun, ĉu vi permesas, ke ni promenu kaj ekzamenu, kiel ordiĝas tiuj ĉi libroj sur tiuj bretoj, kiuj preskaŭ iras ĝis tre alta plafono, ĉu ne ? Ĉu vi grupigis ilin laŭ titoloj aŭ laŭ fakoj ?

KF.- Ne, la libroj viciĝas laŭ la numero en la vico de la enveno, sendepende de ilia enhavo, devena lando aŭ titolo, aŭ pri la temo pri kio ili parolas.

Cl.- Do, tute kiel en normala biblioteko.

KF.- Se oni ne devas elpaŝi el la vico, oni devas sekvi la kutimajn ordojn. Do, ni faris laŭ la grandaj bibliotekoj kaj la katalogado montros la lokon, ĉar ni povas serĉi apartajn titolojn laŭ la titolo, laŭ la verkisto, laŭfakte kaj eĉ laŭ la tradukistoj kaj kunlaborantoj.

Cl.- Sed estas kelkaj esceptoj, ekzemple mi vidas pri Zamenhof, ke la verkoj de Zamenhof estas kunigitaj, ĉu ne ? Ĉu vi havas kelkajn kuniĝojn tiel de fakoj ?

KF.- Kelkajn seriojn, ekzemple la antologiojn, ĉiujn en esperanto aperintajn, la verkaron de Zamenhof, la verkaron de kelkaj elstaraj verkistoj, Auld, Boulton, Edmond Privat Waringhien, Raymond Schwartz kaj la du hungarajn grandulojn, [Baghy](#) kaj [Kalocsay](#), ni gardas aparte por ke tuj povu montri ilin al la interesiĝantoj.

Cl.- Kaj pri Kalocsay, mi konstatas, ke vi havas ĉi tie meblon de li, ĉu ne ? Ĉu vi povas rakonti ?

KF.- La kolektaĵo konsistas ne nur el libroj, kaj ne nur el periodaĵoj, sed objektoj, kiuj rilatas al iu grandulo, havas lokon ĉi tie. Same fotoj kaj personaj memoraĵoj. La skribotablo de Kalocsay kaj la brakseĝo apartenas al la Hungara Esperanto-Asocio, sed oni donis al mi gardi en la ĉirkaŭaĵo de libroj.

Cl.- S-ino Mária Pataki, mi trovas vin ĉi tie ĉe tajpilo, kiu laboras en tiu belega biblioteko. Kiom da tagoj semajne vi laboras ĉi tie ?

MP.- Semajne mi laboras ĉi tie tri tagojn, lunde marde kaj merkrede. Ĵaŭde kaj vendrede mi laboras en mia biblioteko, Peŝta Departamenta Biblioteko en Szentendre.

Cl.- Do, tiel vi garantias la absolute fakan laboron katalogi la librojn, ĉu ?

MP.- Jes, jes, ĉar ankaŭ en mia biblioteko, en hungara biblioteko mi laboras tion.

Cl.- Kaj ĉi tie, ĉu vi povus klarigi, kiel vi katalogas ?

MP.- Jes. Nu, mi faras priskribon laŭ la ŝtata aŭ universala normo, plej nova normo, kaj laŭ la decimala katalogo. Mi faras tiom da slipoj, kiom katalogojn mi havas. Mi havas katalogojn laŭ la verkistoj, laŭ la tradukistoj, redaktoroj kaj tiel plu. Kaj mi havas apartan katalogon laŭ la titoloj kaj fakaj katalogoj.

Cl.- Kaj ĉu vi baldaŭ eldonos tiun katalogon ?

MP.- Jes, ni intencas eldoni presitan katalogon. Nu, eble venontjare, ĉar nun mi jam prilaboris kvarmil-naŭcent librojn.

Cl.- Kaj kiam alvenos je kvinmil ?

MP.- Kvinmil alvenos kaj tiam mi finas. Kaj mi redaktos la presitan katalogon. Poste prilaboros ĉion, kio estas en la biblioteko, precipe la periodaĵojn.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia, kies temo estis la eksterordinare riĉa biblioteko de Károly Fajsz en Budapeŝto. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*